

# Sur la vojo „al Romanoj”

## (Irebla vojo de persona kristana animprizorgado)

La epistolo al Romanoj estas sisteme konstruita lernoasistaĵo kaj tiel tre bona helpo, kiam oni volas transdoni la evangelion de unu persono al la alia. Multaj el la ŝlosilversikloj en la epistolo al Romanoj estas al multaj homoj jam tre konataj kaj oni ne bezonas grandan penon por memori al si tiujn ĉi ok paŝojn.

Komprenoble, oni ne komprenu tiujn ĉi ŝlosilversiklojn kiel biblian ŝablonon. Ĉe ĉiu persono, kiun oni kontaktas, oni devas unue dum interparolo ekzameni, kie oni povas kun ili komenci la komunan vojon kaj per kiu ŝlosilo oni povas ilin akiri por la evangelio.

### 1. Dio amas ĉiujn homojn.



**Rom. 5,8:** *Sed Dio rekomendas al ni Sian amon en tio, ke dum ni ankoraŭ estis pekuloj, Kristo mortis por ni.*

Rilate animprizorgadon estas grava afero, ke oni rajtas antaŭ ĉio klare diri ke Dio amas la homojn. Speciale se temas pri randaj homgrupoj aŭ pri personoj, venantaj el iu alia religia tradicio, kiuj ne konas personecan, prizorgan kaj amantan Dion, la eniro en interparolon per tiu ĉi fakto estas certe la ĝusta. Johano 3, 16, la centro de la evangelio, povas ĉi tie nature esti preparolita.

### 2. Ĉiuj homoj estas pekuloj kaj kulpaj antaŭ Dio



**Röm. 3,10-12:** *Ne ekzistas justulo, ne eĉ unu; ne ekzistas prudentulo, ne ekzistas iu, kiu serĉas Dion; ĉiuj devojiĝis, ĉiuj senutiliĝis; ekzistas neniu, kiu faras bonon, ne eĉ unu.*

Oni estu bone orientita pri sekvaj bibliaj tekstoj:

Rom. 1, 18-32  
Rom. 3, 9-20  
Gal. 5, 19-21

Ne havas grandan sencon, kontinui per animprizorgado, se ne okazas ekkono de propra pekemo kaj pekfarado. Oni povas kun tia persono preĝi kaj proponi al li/ŝi mem preĝi al Dio: „Montru al mi, kiu mi estas.” Folio kun presitaj 10 Ordonoj el Dekalogo 2.Mos. 20 povas

eventuale helpi. Eble tamen ne mankas la ekkono pri sia pekemo kaj pekado. Oni devas dum la interparolo provi elserĉi, kie kaŝiĝas la problemo, post tio oni povas uzi iun alian „ŝlosilon”.

### 3. La interliga punkto kun Dio: la konscienco



**Rom. 2,14 +15: *Ĉar kiam la nacioj, kiuj ne havas la leĝon, faras nature la aferojn de la leĝo, ĉi tiuj, ne havante leĝon, estas leĝo por si mem; kiuj elmontras la faradon de la leĝo skribita en iliaj koroj, kiam ilia konscienco kunatestas, kaj iliaj rezonadoj inter si akuzas aŭ defendas ilin.***

Ne ekzistas homo sen konscienco. Tamen la konscienco ne estas en si mem kompleta aŭtoritato. Ĝi estas influata de:

- ricevita edukado
- ĉirkaŭmondo
- socio
- amaskomunikiloj

Sed tute profunde en sia koro, se la homo estas **sincera**, li/ŝi bone scias, kio estas bona kaj kio malbona. Sekvaj paŝoj, kiuj donas al ni envidon:

Al la sincera homo Dio donacas sukceson - Proverboj 2, 7

Al humilulo Dio donacas gracon - 1.Pet. 5,5

Tiu, kiu neas siajn pekojn, ne havos sukceson; sed tiu, kiu ilin rekonas kaj forlasas, tiu atingos la mizerikordon – Proverboj 28, 13

Se ni niajn pekojn rekonas, Dio estas fidela kaj justa kaj pardonas niajn pekojn kaj nin purigas de ĉiu maljusto. - 1.Joh. 1,9

### 4. Savita kaj justa antaŭ Dio

Oni fariĝas savita sen propra penado aŭ helpe de meritoj.

Oni fariĝas savita pere de la fido en la Savanton Jesuon Kriston.



**Rom.3, 23+24: *Ĉar ĉiuj pekis kaj maltrafis la gloron de Dio; 24 pravigite donace de Lia graco, per la elaçeto, kiu estas en Kristo Jesuo.***

**Rom. 3,28: *Ni do konkludas, ke homo praviĝas per fido, ekster la faroj de la leĝo.***

Kial la savo okazas ekskluzive pere de la fido?

Ĉar tio estas la ununura, de Dio decidita, absolute justa vojo.

- Se oni povus esti savita per monpago – tiukaze nur la riĉaj povus esti savitaj, kio farus maljuston!
- Se oni povus esti savita per certa klerignivelo, tiam nur kleraj kaj insruitaj homoj akiri savon, kio farus maljuston!
- Se oni povus ricevi savon per atento de certaj moralvaloroj, tiam nur tiuj kun tre forta volo povus esti savitaj, kio farus maljuston!

Sed ĉiuj homoj havas kapablon fidi, senrigarde, al kiu kategorio kaj nivelo ili apartenas! Ĉiuj homoj kredas mil kaj mil aferojn. Tiel ekzemple ateisto kredas ke Dio ne ekzistas. Ankaŭ tio estas kredo kaj ne pruvita ekkono.

La savo okazas el graco, ne el la faroj:

*Efs. 2, 8+9: Ĉar per graco vi saviĝis per fido; ne per vi mem: ĝi estas dono de Dio; ne el faroj, por ke neniu fanfaronu.*

*Rom 5, 20 b: Sed kie peko plimultiĝis, graco multe pli superabundis.*

## 5. Kredo = fido kaj obeo



*Rom. 4, 20 —22: Tamen pri la promeso de Dio li ne ŝanceliĝis en nekredemo, sed fortiĝis per fido, donante la gloron al Dio, kaj plene certigite, ke tion, kion Li promesis, Li povas ankaŭ fari. Tial ĝi estis kalkulita al li kiel virto.*

a) Abraham fidis je Dia vorto kaj tio estis prenita por lia justeco.

b) Nun lia fido estis ekzamenita kaj Dio lin lasis atendi. Tamen Abraham fidis je Dio kaj liaj promesoj, eĉ se li devis atendi tiom longe. Tio estas nun la vera fido. Neŝanceligebla fido en ĉiopovan Dion!

c) Kaze de Abraham oni ankaŭ klare vidas la fid-obeon. Li ĉiam denove sekvis la ordonojn de Dio, eĉ se ili estis ekstreme malfacilaj. Tiu obeado tamen ne faris lin justa antaŭ Dio, sed ĝi, kontraŭe, estis la frukto de lia kredo kaj fido. Tiamaniere lia fido fariĝis videbla ankaŭ por liaj kunhomoj.

## 6. La paco kun Dio



*Rom. 5,1: Tial ni, pravigite per fido, havu pacon kun Dio per nia Sinjoro Jesuo Kristo.*

**Jesaja 53,5: Tamen li estis vundita pro niaj pekoj, dispremita pro niaj krimoj; puno por nia bono estis sur li, kaj per lia vundo ni saniĝis.**

Tiu, kiu kredas en Jesuon kaj en fido je lia anstataŭa ofero surkruce pretendas je plena pardono de siaj pekoj, akiris la pacon kun Dio!

**La tiel en la fido troviĝanta homo neniam plu bezonas havi timon antaŭ kolerega kaj punanta Dio.**

**Rom 5,9: Des plimulte do ni, jam pravigite per lia sango, estos per li savitaj el la kolero.**

## 7. Liberaj antaŭ la povo de la peko



**Rom. 6, 6 +7: Sciante, ke nia malnova homo estas kun li krucumita, por ke la korpo de peko estu neniigita, por ke ni jam ne estu sklavoj al peko; ĉar tiu, kiu mortis, estas pravigita pri peko.**

Jesuo forprenis nian malnovan, de Adam hereditan peknaturon (la malnova homo) en sian surkrucan morton.

- Nia malnova homo mortis kun Kristo.
- Kiel la nova homo ni resurektis kun Jesuo.
- **2.Kor. 5,17: Tial se iu homo estas en Kristo, estas jam nova kreitaĵo; la malnovaĵoj forpasis, jen ili jam estiĝis novaj.**
- Nun ni ne servas plu al la peko, sed ni tutkore servas al Dio.

**Rom. 6,22: Sed nun, liberigite el peko, kaj sklaviĝinte al Dio, vi havas vian frukton ĝis sanktiĝo, kaj por fino eternan vivon.**

## 8. Nenio sukcesas senbatale!

Tiu, kiu fariĝis libera de la peko, fariĝis libera ankaŭ el la sklaveco de Satano. Satano, la malamiko de nia animo, ne permesas nin tiel simple senbatale ripozi en nia nove trovita feliĉo. En li troviĝas forta kolero kontraŭ ĉiuj, kiuj fuĝsaviĝis per Dia povo de li. Li neniam restos trankvila kaj li entreprenos ĉion, por reakiri la savitan homon sub sian povon. Li ĉiam denove metos nian pozicion en Jesuo en dubon kaj ĝin tentatakos. Li plene ekspluatas la fakton, ke ni daŭre loĝas en malforta karno kaj meze de tiu ĉi pekanta mondo.

Al ĉiu Dia infano estas destinita propra batalo. Sen la spirita batalo ne troviĝos la krono de la venko!

- La falsa batalo: Rom. 7:**
- en provo atenti plene la leĝon
  - en apogo je propra penado
  - en provo „koncentri sin“
  - en planado kaj ĵurado de bonaj intencoj

**Tiaspeca batalo kondukas al plena fiasko!**



**Rom 7, 18+19:** *Ĉar mi scias, ke en mi (tio estas, en mia karno) bono ne loĝas; ĉar ĉe mi estas la volo, sed ne la elfaro de la bono. Ĉar la bonon, kiun mi volas fari, mi ne faras; sed la malbonon, kiun mi ne volas fari, mi faradas.*

**La falsa batalo povas konduki ĝis malesperiĝo!**

**Rom 7, 24:** *Ho ve, mi malfeliĉulo! kiu min liberigos el la korpo de ĉi tiu morto?*

**La ĝusta batalo: Romanoj 8**



**Rom 8, 1:** *Ekzistas do jam nenia kondamno kontraŭ tiuj, kiuj estas en Kristo Jesuo.*  
**V. 33+34:** *Kiu akuzos la elektitojn de Dio? Dio estas la justiganto; kiu estas la kondamnanto? Kristo estas tiu, kiu mortis, sed leviĝis el la mortintoj, kiu estas dekstre de Dio, kaj ankaŭ propetas por ni.*

Tiu, kiu **ĝuste** batalas, tiu **ripozas** en Jesuo! Jesuo savis nin plene kaj supervenkis la malamikon. Ene de nia novnaskiĝo ni estas plenigitaj de la Sankta Spirito. Jesuo loĝas en ni pere de la Sankta Spirito. Tio estas nia konstanta potencfonto. Tiamaniere nia venko estas certigita.

En tiu ĉi pozicio ni vivas en la Spirito.

Cetere, la malamiko, la karno kaj la pekanta mondo, ankoraŭ troviĝas kaj postulas sian tributon. Tamen la potenco de Dio estas senkompare pli granda!

La Leĝo de la Spirito, do Jesuo mem, nun fariĝis en ni efikoplana.

**Rom. 8 ,12-14:** *Tial do, fratoj, ni estas ŝuldantoj, ne al la karno, por vivi laŭ la karno; ĉar se vi vivas laŭ la karno, vi mortos; sed se per la spirito vi malvivigas la farojn de la korpo, vi vivos. Ĉar ĉiuj, kiuj estas kondukataj de la Spirito de Dio, estas filoj de Dio.*

(El germanlingva origino kun permeso tradukis Vinko Ošlak)

# La evangeliaj kristanoj – kiuj kaj kio ni estas?

## Kiu kaj kio ni estas?

Ni estas disĉiploj de Jesuo Kristo, kredantaj en Dion Patron, la Filon kaj la Sanktan Spiriton, kiel Li manifestiĝas en la kreita mondo, laŭ la homa konscienco kaj plej-plene en la Dia Vorto, do en la ununaskita Filo (Heb. 1, 1-2 ; Heb. 4, 12 ; Rom. 1, 19.20), homiĝinta en la persono de Jesuo Kristo – kaj en la de Dio inspirita revelacio de la Sankta Skribo – la Biblio, el kiu ni estas instruataj pri nia kredo kaj sur kiu ni fundamentas nian vivon konkorde al la fido kaj en la eklezio.

## Kio estas niaj intenco kaj celo?

Niaj intenco kaj celo estas: laŭdi Dion kaj glori Liajn farojn kaj dum rompado de la pano kaj interproponado de la kaliko rememori la lastan vespermanĝon (Luk. 22, 14-20 ; 1Kor. 11, 23-26) kaj lian primican morton sur la kruco, kiel li mem nin taskigis. Ni volas vivi laŭ la ordonoj de Dio kaj postsekvi la modelon de Lia Filo Jesuo Kristo, kiu estas nia nura instruisto kaj estro (Mat. 3, 8-10), por ke ni laŭ lia promeso heredu la Regnon de Dio. Ni volas ĉion-ĉi prediki ankaŭ al tiuj, kiuj ne jam ricevis tiun ĉi ĝojmesaĝon. Por tion efektivi ni vivas kaj anoncas la kredon en Jesuon Kriston kiel nian nuran peranton inter la homo kaj Dio (1.Tim. 2, 5). Nia intenco estas, disponigi nin plene al Jesuo kaj laŭeble multajn homojn akiri por Jesuo, por ke ili fariĝu la infanoj de Dio kaj havu la certecon de la savo. Rigardu: (1.Joh. 5, 13; Agoj 26, 18-19)

## Kion kaj kiamaniere ni kredas?

1. Ni kredas je ekzisto de ununura Dio en la persona triunuo: la Patro, la Filo kaj la Sankta Spirito.
2. Ni kredas, ke Dio, kreinta tiun ĉi mondon kaj en ĝi la homon kaj ĉiujn aliajn estaĵojn, revelaciis sin al la homo per sia Vorto, kiu fariĝis homo kaj venis en la mondon por savi la homaron. La homaro sekve de la Adama peko falis en pekadon kaj tiel defalis de Dio kaj el propra ekkono kaj volo ne povis sin svi kaj reveni al sia Kreinto. Tamen el la amo al la homaro Dio la Patro oferis propran Filon por pardono de la pekoj kaj savo de la homoj (rigardu: Johano 3, 16).
3. Ni kredas, ke veran kredon oni povas akiri el „*aŭdado, kaj aŭdado per la vorto de Kristo*” (Rom. 10, 17). Kaj la Vorto de Kristo estas skribita en la Sankta Skribo, pri kiu ni kredas, kiel diras la apostolo Paŭlo: „*Ĉiu skribaĵo estas inspirita de Dio*” (2.Tim. 3, 16). Ni samtiel kredas ke ĝi estas en sia tuto vera, kiel certigas al ni Dio tra la vorto laŭ Johano: „*Konsekru ilin en la vero; Via vorto estas vero*” (Joh. 17, 17).
4. Ni kredas, ke sekve de la Adama peko nia naturo falis el la stato de senkulpeco, kiu al niaj pragepatroj malfermis senperan aliron al Dio. Ne ekzistas, nome, homo, kiu ne pekus. „*Se ni diras, ke pekon ni ne havas, ni nin trompas, kaj la vero ne estas en ni*” (1.Joh. 1, 8). Tiamaniere ni ĉiuj meritas la poreternan punon. „*Ĉar la salajro de peko estas morto; sed la donaco de Dio*

*estas eterna vivo en Kristo Jesuo, nia Sinjoro*” (Rom. 6, 23).

5. Ni kredas ke la savo troviĝas nure en Jesuo. „*Kaj en neniu alia estas savo; ĉar ne estas sub la ĉielo alia nomo, donita inter homoj, per kiu ni devas esti savitaj*” (Agoj 4, 12). Nia Sinjoro mem diris al ni ĉiuj dum la interparolo kun Nikodemo (rigardu: Joh. 3, 3) ke ni ne vidos la Regnon de Dio, se ni ne naskiĝos denove desupre. La novnaskiĝon en la Spirito kaj akvo oni atingas per pento kaj rekono de ĉiuj pekoj en interparolo kun Dio, kaj per alpreno de la fido en Jesuon Kriston kiel la nura peranto kaj Savanto (rigardu: Joh. 14, 6). Tiel estas al ni certigite: „*Ĉar se vi per via buŝo konfesas Jesuon Sinjoro, kaj kredas en via koro, ke Dio lin levis el la mortintoj, vi saviĝos*” (Rim. 10, 9). Tiel la homo ne povas atingi savon per siaj faroj, per sia „bonkoreco”, moraleco aŭ celebrado de diversaj ritoj kaj moroj. Ni havas la savon kiel donacon el la Dia graco surbaze de la sinofero kaj suferado de Jesuo kaj lia morto sur la kruco (rigardu: Efs. 2, 1-10; Gal. 2, 16-21).

### **La eklezio de Kristo**

Ni, evangeliaj kristanoj, estas per nia kredo en Jesuon Kriston kaj per nia komuna legado kaj eksplikado de Dia Vorto, per nia komuna adorado de Dio en vorto kaj kantado, per komuna preĝado kaj rompado de la pano kaj proponado de la kaliko membroj de la universala eklezio, fondita de Jesuo Kristo mem. Nian apartenon al la eklezio ni realigas en diversaj lokaj eklezioj resp. komunumoj, kiuj konsistigas la universalan eklezion de Kristo. La unueco estas donita per la komuna kredo en Jesuon Kriston kaj per alpreno kaj efektivigo de lia instruo, sed ne per formala aparteno al iu sama centreca organizaĵo, hierarkio kaj disciplino. Tiel ni povas aparteni al kristanaj eklezioj kaj komunumoj sub diversaj nomoj, tamen, ĉar Kristo estas por ni ĉiuj la kapo kaj la fundamento de la eklezio, ĝia nura ĉefestro, ni troviĝas spite al organiza diverseco, en unueco kun li. (Rigardu: Kol. 1, 17)

La eklezio de Kristo komencis ekzisti per la pentekosta tago kaj miraklo en Jerusalemo (rigardu: Agoj 2, 1) kaj finos sian mision per la dua alveno de Kristo, kiam li forprenos sian eklezion en ĉielon kaj kun ĝi, kune kun ĉiuj revokitaj en vivon, se ili endormis en Sinjoro, revenos sur la teron en reĝa majesto kaj povo. La homo ne povas esti vera kristano en daŭra soleco (rigardu: 1.Kor. 12-31), tial la tasko de ĉiu kristano estas, post la alpreno de la kredo kaj bapto serĉi komunumon, kiu baziĝas en la Vorto de Dio – la Biblio, partoprenante la kristanan vivon de tiel trovita komunumo kiel parto de la universala eklezio.

### **La vivo en Kristo**

La vivo de la kristanoj realiĝas en la atestado por Kristo senpere per predikado al paganoj kaj nekredantoj, kaj kiel modelo per sanktigita vivo en akordo kun la volo de Dio kaj taskigoj de Jesuo (rigardu: Tit. 2, 11). Tio tamen signifas rezigni pri la mondo – ne en la senco sin izoli aŭ ekskludi el la homa socio, ne per iu ajn strangulaĵo, sed en la senco de absoluta prefero por la Sinjoro antaŭ la postuloj kaj atendoj de la mondo. La aŭtenta kristano, ĉiam estante konscie konvertita

homo, ja oni sian kristanan kredon ne povas heredi aŭ lerni aŭ simple aliĝi al ĝi per subskribita papero, ĝukonsumas la fruktojn de la tero kaj sia laboro en akordo kun la modelo de Kristo – sed li/ŝi rifuzas orientigon de sia vivo laŭ materiaj bonaĵoj, mono, gloro, renomo kaj laŭdo fare de la mondo. La kristano ĉiam, kiel lin taskigis la Sinjoro, prefere serĉas la Regnon de Dio kaj dankeme akceptas tion, kio estas laŭ Dia promeso aldonita: „*Sed celu unue Lian Regnon kaj Lian justecon, kaj ĉio tio estos aldonita al vi*” (Mat. 6, 33) – kaj tion, li/ŝi dividas kun la bezonantaj kaj premataj. Vera kristano konscias ke lia/ŝia korpo estas la templo de la Sankta Spirito (rigardu: 1.Kor. 3, 16) kaj viva konstruŝtono (rigardu: 1.Pet 2, 5) en la konstruaĵo de la eklezio de Kristo; tial li/ŝi atentis ne makuli sin disponigante sian korpon al nepermesita ĝuado kaj aparte al dependeco kaj posedeco de la malbona spirito. Vera kristano akumulas sian trezoron en la ĉielo, „*kie nek tineo nek rusto konsumas, kaj kie ŝtelistoj nek trafosas nek ŝtelas*” (rigardu: Mat. 6, 20), kiel en siaj alegorioj nin avertas la Sinjoro.

La vivo de vera kristano konsistas kaj plenumiĝas el plenumitaj bazaj vivotaskigoj kaj misioj, kiajn Dio komisiis jam al la unua homa paro en la paradizo: „*Fruktu kaj multiĝu, kaj plenigu la teron kaj submetu ĝin al vi, kaj regu super la fiŝoj de la maro kaj super la birdoj de la ĉielo, kaj super ĉiuj bestoj, kiuj moviĝas sur la tero*” (1.Mos. 1, 27b) kaj per la taskigo de adorado kaj laŭdado (rigardu 1.Kor. 10, 31) de Dio per vortoj, kantoj kaj muziko kaj per adekvataj faroj de la amo kaj mizerikordo; per preĝado en soleco, en familio, en duopo, triopo kaj per kunvenado en la komunumo; per legado kaj meditado de la Vorto de Dio.

(Subrevizie de Jovan Stupar, Dominik Kert kaj sac.Benjamin Hlastan formulis Vinko Oŝlak)

---

Eldonis la grupo de kristanoj en Klaŭdiforomo (Klagenfurt / Celovec), kredantaj surbaze de la Biblio, kiuj regule legas kaj reciproke eksplikas la Biblion en Esperanton – ĉiuj aŭde je la 17-a horo en la kafejo SEVER. Por ili Vinko Oŝlak.

Interreta adreso: [oslak.vinko@gmx.at](mailto:oslak.vinko@gmx.at)